**EKO 2022**
**Esperiga Komuniko**

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA · ILEI · IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 56>** ● AMO 82 ● Poznano plu ● Ondo ● Paco ● Aŭstralio **< okt. 10**

# AMO 82 okazis en Kubo

Jen la saluta teksto de SMG por laŭtlego komence de la seminario: Pliaj raportoj pri la enhavo de la seminario sekvos.

-------------

Kun granda ĝojo mi deklaras, ke la 92-a AMO-seminario estas malfermita! Ĝi esploros la temon  de la reveno al aktiveco postpandemia.

AMO havas tradicion en Kubo; okazis jam en novembro 2015 la 16-a AMO-seminario kun la temo ‘profesiigo’. La sekva, AMO 43, okazis en marto 2018 ene de la latinamerika aranĝo TAKE (Tut-Amerika Kongreso de UEA) kun la temo ‘aktivula trejnado’. Pro TAKE, la partoprenantoj venis el kelkaj amerikaj landoj.

Mi aparte ĝojas pri du evoluoj. Unue, via movado sukcesis refortigi sin post la pandemio de Kovim kaj konkrete pere de la AMO-programo. Due, ke vi por la unua fojo organizas duan parton de AMO 92 decembre en Guantanamo, do en tute alia parto de la lando ol la ĉefurbo.

Mi memoras kun ĝojo la partoprenon en UK-oj en 1990 kaj 2010 en la sama kongresa centro en Havano, kaj restas ankoraŭ pli belaj memoroj el la pli modestskalaj Kongresoj de ILEI: en 1990 en la monta paradizo en Hanabaniljo, kaj en 2010 en la river-mara paradizo en Matanzas (vidu la ekskursan foton tie)

Do, revenu sukcese el la pandemio, kaj kreu novajn projektojn. Subteno de la AMO-programo tre dezirindas, ankaŭ kiam ni pasos la centan seminarion en la frua novjaro.



Sukceson en viaj diskutoj!

-------------

La skemo por AMO spertis modifiĝon, ĉar IKEF ne povis organizi sian seminarion en la anoncita dato. Ĝi do fariĝos AMO 93 kaj okazos nun en la 23-a de oktobro, kiel ĉiam, en dimanĉo. La temo restas senŝanĝa: ‘Eŭrazia Ekonomia Kunlaboro.’

## Interlingvistike en Poznano refoje

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>
La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe Novaĵoj.

Titolo: Surloke kaj distance, serioze kaj amike (interlingvistika sesio de AMU (La universitato Adam Miickievicz, 17-23.sept.22)

La dua jaro de la aktuala interlingvistika grupo travivis sian septembran sesion, parte surloke, parte distance – danke al Katalin Kováts, kiu prizorgis la hibridan sesion. La studsemajnfinon sekvis ARKONES, al kiu la partoprenantoj aktive kontribuis.

Legu pli ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=878

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Katalogo.

Titolo: Esperanta kulturo
Aŭtoroj: KOUTNY, Ilona (Red.)

Legu pli ĉe la paĝo: https://edukado.net/biblioteko/libroj?iid=23515

## Fotoj el la UK en Montrealo

Kaj jen la ligilo de mia prezento de miaj fotoj kaj videoj dum la 107-a UK en Montrealo

https://youtu.be/25aT0TD2ubs

John Huang de IKEF

## Pacostreba ideo por afiŝo

La informa grupo de UEA aktivas. Ĝi daŭre laboras pri nia mesaĝado, interalie lige kun niaj Festindaj Tagoj

Preparis kaj sendis Mariana Evlogieva el Bulgario.




## 62-a Argentina Kongreso de Esperanto

De la 7-a ĝis la 10-a de oktobro 2022 okazis la

62-a Argentina Kongreso de Esperanto (AKE) en la Bonaera Esperanto-Asocio, strato Paraguay 2357, Apto.2., Aŭtonoma Urbo Bonaero.

La internacia lingvo Esperanto vekas pli kaj pli la intereson de la ĝenerala publiko.Kelkaj el ili rekte lernas Esperanton el la interreto. En Argentino, ekde 1916 regule okazas eventoj en Esperanto.

Argentina Esperanto-Ligo (AEL),m https://esperantoargentino.weebly.com/

# Reta aliro al nia lingvo tra Aŭstralio

Tio estas senpaga lernoprogramo havebla ĉe pluraj biblioteko-retejoj en Aŭstralio, kaj Esperanto estas unu el la ofertitaj lingvoj. Ĝin prizorgas la kompanio 'Transparent Language Online'. [Antipoduloj] esploru, ĉu ĝi haveblas ĉe via loka biblioteko, kaj por komenci, sekvu ĝiajn retejajn registrigo-instrukciojn. La kurso permesos al vi komenci kaj halti kiam ajn, sen perdo de via pozicio, kaj aŭtomate kronikos vian progreson. Ĝi taŭgas por komencantoj ĝis altgradantoj kaj povas esti studata per via hejma komputilo, tabulkomputilo (tablet) aŭ komputiltelefono (Smartphone). Por tute interrilati, oni rigardas, aŭskultas, legas kaj ankaŭ parolas per mikrofono – vi povos enketi pri aliro al tiu per la biblioteka komputilo. La Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio promocios T.L.I. ĉe *Have a Go Day* (Provu! Tago), grava ĉiujara okazo en Perth, ĉi-jare en novembro la 9-an.

Trish O'Connor - esperanto@hotmail. Tradukis Vera Payne




# Internacia Pedagogia Revuo elstaras

## Pri la enhavo de IPR 2022/3 (Jarkolekto 52)


- Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) p.3
- Ahmad Reza MAMDUHI: VEKI-3: jam kutima kongresformo! p.4
- Impresoj de kelkaj partoprenintoj de VEKI-3 (A. LASLO, L. OBERRAUCH, M. GARCIA, R. CORSETTI, M. GROSJEAN) p.21
- Salutmesaĝo de UEA al la 55-a Kongreso de ILEI (Duncan CHARTERS) p.23
- Radojica PETROVIĆ: Realaj spertoj el virtualaj eventoj p.25
- Premio La Torre 2022 estis aljuĝita al Nitta Takamichi p.28
- El la landoj kaj sekcioj (CN, DE, IT, RS) p.30
- AMO ĝis la jarfino (Stefan MACGILL) p.35
- Alvoko kaj aliĝilo por la 56-a Kongreso de ILEI en Italio p.37
- Informoj pri ILEI, redakciaj informoj p.36, p.39


**Sur la titolpaĝo**: **supre**: Prof. Pennacchietti prelegas en la Simpozio, **Sur la dorskovrilo**: ekranfoto farita ĉe la fermo de VEKI-3.

Alirvojo al la malpeza PDF-versio: http://ilei.info/pdf/Ipr223-ete_jfgsdfg.pdf
Amplekso: 1730 KB

Se vi ne estas membro de ILEI, rigardu la numeron kaj provu mem, por ricevadi la aparte bonkvalitan fakan revuon de ILEI.

# Tajvanaj lecionoj

Ĉi tiu kurso okazas jam 22 jarojn sinsekve kaj ĝi estas kadre de ekster-kursa lecionaro en mezalta lernejo Pingrong kiu estas la plej granda tia lernejo en la sudo de Tajvano. Kutime la nombro de niaj lernantoj varias de 10 ĝis iom pli ol 20 kaj kvankam estas la minimuma nombro de 40 por malfermi similajn kursojn, tamen en kazo de tiu ĉi kurso oni faras escepton unue pro ĝiaj nekonateco kaj unikeco kaj due pro ĝia internacieco: Ĉiujare ni havas korespondadon kun Esperanto-kluboj en aliaj landoj kaj ankaŭ fojfoje ni havas eksterlandan gaston en la kurso.

En la fino de ĉiu eduka jaro ni disdonas ateston al la lernantoj kiuj havas la logo-tipojn de UEA kaj tiun de la lernejo. Ni uzas la lernolibron "Esperanto per rekta metodo" de Stano Marček kaj ankaŭ aliajn materialojn kiel Mazi en Gondolando, kantojn, ludojn ktp.  Kun tiu ĉi raporto mi sendas foton de la kurso kiu okazis antaŭ kelkaj jaroj en kiu troviĝas Ingrid Chuang, la ĉefa instruisto, Reza, la asistanto de la kurso kaj Liru Chen la gasto.




========= vortoj:  970 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.